



3*1992*150

STARTO

ORGANO DE ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO



Doktoro Josef Kavka - jubilanto

ZPRÁVY ZE SEKRETARIÁTU ČES

DEN OTEVŘENÝCH DVEŘÍ SEKRETARIÁTU ZRUŠEN

Protože střeďeční "Den otevřených dveří" není již delší dobu členy využíván, rozhodla rada ČES o jeho zrušení počínaje měsícem květnem 1992. Ze stejného důvodu se ruší i čtvrtěční "pokladní den". Jak se již stalo zvykem, mohou členové svazu přijít na sekretariát s dotazy, stížnostmi apod. v kterýkoliv pracovní den v týdnu za tajemníkem. Doporučujeme však domluvit si schůzku předem buď písemně nebo telefonicky.

zp

NABÍDKA UČEBNIC A KNIH KE STUDIU ESPERANTA

Zájemce, kteří se připravují ke svazovým zkouškám, nebo ty, kdo se chtějí prostě dále zdokonalovat v esperantu, upozorňujeme, že naše prodejna právě znovu doplnila soubor učebnic a příruček pro studium esperanta. Doporučujeme např.:

- V. BARANOVSKÁ: Esperanto pro samouky ... 35,- Kčs
J. CINK: Cvičebnice esperanta pro pokročilé ... 24,- Kčs
W. AULD: Paŝoj al plena posedo (čítanka s cvičeními a výkladovými slovníčky k jednotlivým cvičením ... 42,- Kčs
J. BAGHY: Gramatika demandaro resuma ... 19,- Kčs
H. SEPPIK: La tuta Esperanto (pokročilé studium mluvnice esperanta) ... 35,- Kčs
C. PIRON: La bona lingvo (jazykové studie především z hlediska stylu) ... 45,- Kčs
A. PECHAN: Gvidlibro por supera ekzameno. Historio, literaturo kaj metodologio (tato výborná příručka je proti předchozím vydáním rozšířena o 60 stran věnovaných metodice) ... 36,- Kčs
V. SETÄLÄ: Privilegia vojo al lingvoscio ... 80,- Kčs
E. PRIVAT: Esprimo de sentoj en Esperanto ... 45,- Kčs
V. SETÄLÄ, E. VILBORG, C. STØP-BOWITZ: Esperanto - moderna lingvo
R. DE SAUSSURE: La vort-strukturo en Esperanto ... 25,- Kčs
S. KAMARÝT: Historio de la Esperanto-movado en Ĉeĥoslovakio ... 20,- Kčs

Těšíme se na Vaše objednávky!

Estas por mi granda honoro skribi kelkajn liniojn honore al D-ro Josef Kavka, elstara sciencisto kaj esperantisto. Ĉiam li estas afabla, oferema, saĝe parolanta, tamen modesta homo, kiu devus esti modelo de vera esperantisto-sciencisto.

Li naskiĝis la 25-an de aprilo 1922 en Hořovice, meza Bohemio. Jam en infanaĝo li estis tuŝita de Esperanto. Lia patro inter alie korespondadis eĉ kun Majstro jam antaŭ la 1-a mondmilito. En 1933 kiel gimnaziano li "prelegis: pri Esperanto enkadre de ĉeĥlingva retorika leciono ne imagante, ke ĝuste Esperanto ŝolos tiom signifoplene dum lia vivo. Tamen, pli aktive li dediĉis sin al Esperanto nur post la 2-a mondmilito.

D-ro Kavka estas sciencisto-geologo, specialiĝinta al petrologio, do scienco pri rokaĵoj. Objekto de lia intereso estas precipe vulkanrokaĵoj de alkala karaktero, kiuj troviĝas en diversaj anguloj de nia planedo, inter alie en norda Bohemio, Pollando, Saksio, ĉirkaŭaĵo de Rejn-rivero, Francio, Italio, Portugalio, Kanariaj insuloj, Madejro, Verdkabaj insuloj, Madagaskaro, Afriko, Usono, Aŭstralio, Nova Zelando kaj aliloke. Tie ĉie li trovis esperantistojn-korespondantojn, kiuj provizis lin per fakaj publikaĵoj pri lokaj geologiaj specialaĵoj kaj sendadis al li specimenojn de rokaĵoj kaj helpe de tio li povis studi kaj kompari kondiĉojn de la genezo, evoluo, konsisto minerala kaj Ĥemia, ekonomian uzeblon kaj ceterajn interesajn faktojn pri alkaliaj vulkanaĵoj.

La rezultojn de la esploroj, kiujn li povis realigi inter alie ankaŭ helpe de siaj diverslokaj esperantistaj kolegoj li redonacis al faka esperantistaro priskribante ilin ĉiam ankaŭ en Esperanto. Neniam li forgesis ankaŭ en siaj nacilingve skribitaj verkoj aludi la rolon de Esperanto por la koncerna esploro. Tiamaniere li kapablis samtempe utiligi Esperanton por sciencaj celoj kaj altigi la konscion de kolegoj-geologoj pri Esperanto kaj ĝiaj ebloj.

Ĝis la jaro 1990 la amplekso de liaj publikaĵoj estas 230 verkoj, plejparte sciencnivelaj. Sed ankaŭ troviĝas inter ili popularsciencaj artikoloj aŭ verkoj pri la lingvaj demandoj de Esperanto. La plej valora donaco al esperantistaro estas laŭ mia opinio traduko de mapoj por la Poŝatlaso de la mondo eldonita fare de Kartografie (t.e. Kartografia eldonejo) en 1970 aŭspicie de Geologia Sekcio de ISAE, kie li signifoplene kontribuis al la geografia nomenklaturado.

D-ro Kavka apartenas al la plej fidelaj membroj kaj funkciuloj de Internacia Scienca Asocio Esperantista. Abonanto de Scienca Revuo li estas ekde la 1-a volumo (1949) ĝis nun. Inter 1961 kaj 1973 li plenumis la taskon de landa delegito de ISAE, en 1965 li fondis Geologian Sekcio de ISAE kaj kelkajn jarojn li restis ĝia gvidanto. Same estis li, kiu fondis la periodaĵon Geologio Internacia, kies ĉefredaktoro (vicredaktoro, scienca redaktoro) li estis ekde la 1-a volumo (1967) ĝis la 8-a volumo (1990).

Dum la jaroj 1971 ĝis 1980 li plenumis la taskon de ĝenerala sekretario de ISAE, en 1974 organizis kiel scienca sekretario en Varsovio simpozion Internacia Lingvo kaj Geologio aranĝita fare de Geologia Sekcio de ISAE. Kaj ekde 1978 ĝis 1987 li tre altnivela redaktis la organon de ISAE Scienca Revuo kiel ĉefredaktoro,

sekve dum 1988-1989 ankoraŭ kiel kunredaktoro. Dum sia redaktora agado li ĉiam havis enkapo ne nur la bonan lingvan kaj enhavan nivelon de la organo, sed ankaŭ la taskon de la redaktoro lingve eduki la komencantajn aŭtorojn.

Ne estas supertakso, se mi asertas, ke danke al D-ro Kavka naskiĝis dekoj da novaj fakaj aplikantoj de Esperanto, kiuj sen li apenaŭ iam kuraĝus memstare science verki en Esperanto. Mi mem apartenas al tiuj disĉiploj de li, kiu neniam forgesos liajn afablajn rimarkojn kaj rekomendojn akompanantajn rericevintan manuskripton kun ĉiama oferto pri pridiskuto de unuopaj instigoj liaj. Kvankam li brilis alte super ni komencantoj, ĉiam li vidis en ni samrajtajn kolegojn kaj estis vera ĝuo lasi sin gvidi kaj eduki de li.

Al la unua alineo, kie mi skribis, ke li estas elstara sciencisto kaj esperantisto, mi do fine de la artikoleto devas aldoni, ke li estas perfekta pedagogo ne nur en faka medio (kiu li tamen ankaŭ estas), sed ankaŭ perfekta edukanto de komencantaj aŭtoroj de fakaj verkoj kaj precipe elstara, perfekta kaj bona homo.

Mi deziras al kara kolego kaj amiko mia, D-ro Josef Kavka, ne nur mianome, sed ankaŭ nome de ĉiuj ceteraj fakuloj en Esperantujo firmajn sanon kaj forton kaj multajn jarojn de sekva agrabla vivo en kara medio de siaj plej proksimaj parencoj: afabla kaj por Esperanto tolerema edzino, filino, denaska esperantistino kun edzo kaj jam du novaj denaskaj esperantistoj (danke al la avo D-ro Kavka, kompreneble!)

Petro Chrdle, prezidanto de ĈEA

INTERNACIA KONKURSO PRI MODELA E-PRONONCADO por gejunuloj 15-19-jaraj; **KONKURSO PRI ARTA TRADUKO** kaj **POENTOKOLEKTA KONKURSO** por gelernantoj estas novaj aktivecoj por instruantoj de Esperanto kaj iliaj kursanoj. Informojn petu ĉe Géza Kurucz, Hítel utca 10, tszt.16, 6000 Kecskemét, Hungario.

EVENTOJ estas nova Esperanta gazeto **dusemjna** eldonata en Hungario kaj abonebla ankaŭ rekte ĉe ĈEA.

ŜERCOJ estas titolo de nova publikaĵo de la slovakaj esperantistoj. Anekdotojn elektis kaj tradukis E.V. Tvarožek.

KATOLIKA ESPERANTA TENDARO en Sebrance apud Litomyšl ĉi-jare efektiviĝos en aŭgusto (8/22). Konvenas precipe por

junularo ekde la 15-a jaro, infanoj ĝis 15 jaroj povas cesti en akompano de plenkreskuloj. Okazos kursoj por komencantoj kaj progresiga. Banado, tendarfajro, sankta meso. Rapidkurso de gitarludo. 50 lokoj en tendoj, ev. tranoktejo de loka kooperativo. Aliĝiloj sendu al Miroslav Šváček, ul. Tršická 6, 751 27 Pěnčice.

ESPERANTO-TENDARON en Ošelín aranĝos la klubo "Esperanto" en Plzeň en la tagoj 1992-08-22/29. Estas preparataj nedeviga Esperanto-instruado por komencantoj kaj progresintoj, prelegoj pri Esperanto. Kotizo 699 Kčs por plenkreskuloj, 599 Kčs por infanoj ĝis 10-jaraj; eksterlandanoj 1200 Kčs. Aliĝilojn sendu al: ESPERANTO, Vele-slavínova 14, 301 14 Plzeň.

Esperanta Printempo en Vieno

Kiam en la unuamajaj Vienaj avenuoj kaj parkoj svarmis turistoj fotante kaj filmante jen mikelanĝeleskajn aŭ politikajn statuojn, jen trotantajn ĉevaletojn kun kaleŝojn, jen programon de plumvestita ensemblo de veraj indianoj kaj kiam en multaj lokoj gaje melodiis folkloraj muzikbandoj, kolektiĝis en la Hofburga Esperanto-Muzeo du internaciaj grupoj de esperantistoj po ĉirkaŭ dudek tridek personoj. La grupo de komencantoj en la muzea kancelario lasis sin paroligi en "Internacia Cseh-Kurso por Tutkomencantoj" de la hungara specialistino Kati Smideliusz, dum la alia kolektivo okupis seĝojn en la meza ekspozicia ĉambro por aŭskulti la sugestajn prelegojn de Claude Piron laŭ la seminaria temo "Jes, Esperanto estas taŭga lingvo". La partoprenantoj venis el Aŭstralio, Aŭstrio, Bulgario, Ĉeĥoslovakio, Germanio kaj Italio.

La ĝojan etoson de la seminario vekis jam la unua ekspozicia ĉambro, nove aranĝita per grandaj marmoraj kuboĵoj kun koloraj bildoj, fotoj kaj portretoj, tablo kun kafo, teo kaj kuketoj kaj aminda hundino Pigi, kiu ĉiun bonvenigis kiel malnovan kamaradon. S-ro Mayer, la direktoro de la muzeo, prezentis tre viglan kaj temperaman "eksjunulon" antaŭpensian, kun iom griziĝintaj, sed energie starantaj kurtajharoj, kiel la faman svisan psikologon, tradukiston, interpretiston kaj E-verkiston Claude Piron, pseŭdonome Johano Valano, kies verkoj (Gerta malaperis!, La bona lingvo k.a.) aĉetebblas ankaŭ en la muzeo.

La aŭskultantojn atendis torente fluaĵ prelegoj, ne legataj, sed vulkane improvizataj, klare kaj laŭte prononcataj, dum kiuj la oratoro alterne eksidadis sur seĝon kaj postmomente salte leviĝadis por geste emfazi gravan ideon. "Eble mi eraras," li ripetis ofte, apogante la ĉefan fadenon de siaj temoj: ke la homoj senĉese trompas sin mem per diversaj iluzioj, misocioj kaj antaŭjuĝoj, kio modlas ankaŭ la ĝeneralan starpunkton de la publiko al la Esperanto-movado.

La vendreda posttagmezo (la unua seminaria tago) estis dediĉita al **Psikologiaj aspektoj de la lingvoproblemo**. Ni naskiĝas kiel biologiaj robotoj, reflekse kaj instinkte reagantaj, en kiuj dum la unuaj sep jaroj instaliĝas la psiko. Nia ĉefa bezono estas sento de sekureco, kiun ni ĝuas precipe en la patrino sino, sed samtempe vekiĝas en ni exploremo, aventuremo kaj sopiro pri potenco. La lingvo komenciĝas en la 16-a monato, kiam bebo jam ludas per objektoj imagante, ke kraĵono estas jen aŭtomobilo (la bebo motore murmuris), jen muŝo (zumado), jen paŝanta persono. Tiu simbolado estas propra al lingvo, ĉar inter la vorto (sonsigno) kaj ĝia signifo ne ekzistas rekta rilato (la sama signifo povas havi diversajn signifojn). La infano komence parolas pri si kiel pri aliulo (Joĉjo volas ĉokoladon), sed la lingvo helpas formi konscion pri si mem (mi volas ĉokoladon), formi propran egoon. La ego evidentiĝas konflikton inter sopiro (ĉu mi ŝtelu la ĉokoladon?) kaj bezono esti amata (la panjo koleros!). Se la propra deziro ne povas realiĝi, ĝi projekciaĝas en aliajn personojn (ĉiuj certe volas manĝi la ĉokoladon!). En la ego vekiĝas sopiro esti admirata (falusa periodo, kiam knabo fieras per sia organeto). Por etulo ĉio agrabla estas bona kaj ĉion malagrablan li komprenas kiel malbonon. Ĉirkaŭ la sesa jaro la infano komencas rimarki, ke ekzistas ankaŭ morala diferenco inter la bono kaj malbono, kio donas la vivon al sopiro fariĝi bona homo.

Evoluo de la psiko influas ankaŭ nian rilaton al la lingvoj kaj al la lingva problemo. Komence ni povis nur krii kaj plori, sed poste okazis miraklo, kaj ni kapablas esprimiĝi kaj komuniki. La lingvo ŝajnas al ni esti io supernatura, dia, sankta, kaj la ideo de internacia lingvo ŝokas kiel sakrilegio. La angla imponas per sia potenco kaj la deziro ekregi per ĝi la mondon projekciĝas en suspekton, ke aliaj volas fari la samon per alia lingvo. Lernante la gepatran idiomon, ni devas submetiĝi al la aŭtoritato de lingva tradicio, anstataŭ logikajn naturajn formojn ni lernas (senĉese korektataj de plenkreskuloj) la tradiciajn malregulaĵojn kaj esceptojn, hereditajn de la prapatroj. La samon ni devas fari studante fremdan nacian lingvon, neniam ni sentas nin en ĝi sekuraj, neniam kvazaŭ hejme (hungaro neniam sentas sin anglalingvano aŭ franclingvano). Male la skeme regula Esperanto donas sekurecon kaj hejmecon, parolantoj sentas sin esperantistoj. Esperanto formas identecon, mokado pri Esperanto incitas ofendiĝemon, simile kiel mokado pri la lingvo gepatra.

La unua sabata prelego koncernis **Socian funkcion de lingvo**. Ofte oni povas distingi laŭ la prononcmaniere la regionon aŭ socian tavolon de la parolanto, do la lingvo servas ne nur al komunikado, sed ankaŭ al distingado, eĉ al kaŝado (paroli lingvon, kiun aliaj ne komprenas). Originaleco flatas nian memplaĉon: verŝajne multaj esperantistoj en la profundo de la animo ne deziras, ke Esperanto vere disvastiĝu. Esperantujo posedas multajn komunajn trajtojn kun vilaĝo: ĉiuj sin konas reciproke, klaĉas unu pri la alia (en Usono oni povas aŭdi novaĵojn de hispano pri japano), sed samtempe sentas fortan solidarecon kaj komunan socian identecon. Esperanto certagrade similas ankaŭ al kreolaj lingvoj, kiujn formis iamaj sklavoj de diversaj nacioj pro urĝa bezono interkompreniĝi maksimume per minimumaj rimedoj.

Probable la plej grava prelego estis la sekva, pri **Antaŭjuĝoj**, speciale kontraŭ Esperanto. Niaj scioj similas al teksaĵo, kies truojn ni ne volas vidi; ĉiun nian ĝustan scion ĉirkaŭas 99 nescioj, pseŭdoscioj, kvazaŭscioj aŭ misscioj. La homoj honeste konfesas, ke ili nenion scias pri la indonezia, kaj ili ne kuraĝas ion aserti pri ĝi, ĉar la indonezia estas fakto, sed fakto por ili nekonata. Esperanton ili ne perceptas kiel fakton, sed kiel projekton, al kiu ili rajtas aŭ eĉ devas akcepti ian starpunkton. Kaj ĉar ni postulas lernadon, la starpunkto estas negativa, sed la homoj ne konscias pri sia motivo. Ili nenion scias pri la riĉeco kaj esprimkapablo de Esperanto, pri la kapablo de esperantistoj komuniki, pri la Esperanta kulturo, literaturo, sed al ili ŝajnas tiel evidenta, klara kaj natura, ke artefarita lingvo devas esti malriĉa, neparolebla, senkultura, ke ili ne konscias pri sia mensogo, kiam ili deklaras tion eĉ publike. La mensogoj penetris ankaŭ en lernolibrojn de lingvistiko, ĉar ankaŭ al lingvistoj ŝajnas ĉi ĉio evidenta eĉ sen serioza scienca esplorado. En la nacilingvaj gazetaroj Esperanto aperas jen kiel sinonimo de io pozitiva (muzika esperanto sonis tra la koncertejoj, la angla estas esperanto de nuntempo), jen kiel simbolo de io negativa (esperantistecaj miskomprenoj, Eŭropo kun kulturo jes, kun Esperanto ne!) aŭ kiel io forprenanta prestiĝon (la troa elmontrado de simpatio al Esperanto ĉe Franz Jonas vekas mokridon).

[Ĉu la kaŭzo ne estas, ke ni multe persvadas, sed malmulte informas pri la reala stato de la movado? Ke ni pli propagandas ol uzas la lingvon? Ke ni serĉas venkon por lingvo anstataŭ por homoj? - rim. M.M.]

La lasta prelego pri **Lingvistikaj Aspektoj** starigis la demandojn pri origino kaj karaktero de Esperanto. Multaj homoj rifuzas ĝin pro ĝia troa okcidenteco, aliaj pro malgranda okcidenteco. Sajnas, ke Zamenhof ofte arbitre kunfadis anglajn kaj germanajn vortojn (home, Heim = hejmo; stone, Stein = ŝtono; fire, Feuer = fajro), dum li transprenis ilin el la jida, kiun parolis la juda komunumo en Bjalistoko (sed li sekretigis tion pro kompreneblaj kialoj). En esperanto estas forta slava influo (akcento, stilo, ortografio), la regula derivado koincidas kun multaj neeŭropaj lingvoj, sed ankaŭ kun parolmaniero de infanoj, por kiuj regulaĵo estas multe pli natura ol malregulaĵo. Cetere ankaŭ plenkreskuloj lernantaj fremdan lingvon inklinas al regulaj formoj (gentlemens), eĉ se en ilia gepatra lingvo ekzistas la sama malregulaĵo. Ekzemple angloj (kaj francoj) lernantaj france (kaj angle) inklinas uzi post "se" (= si, if) kondicionalon, kvankam en ambaŭ lingvoj tio ne eblas. Tio pruvas, ke la homa cerbo preferas analogion antaŭ tradukado el la gepatra lingvo, ĝi asimilas kaj ĝeneraligas, laŭ modelo formas analogiajn formojn.

Esperanto obeas tiun tendencon de la homa menso kaj kreas por siaj parolantoj hejmecon medion. Se iu volas pruvi malriĉecon de la internacia lingvo per neeblo traduki specialaĵojn de tiu aŭ alia nacia lingvo, petu lin traduki en lian nacian lingvon jenajn esprimojn: samlingvanoj, malsomera sezono, ĝismatenaj kunsidoj, malĉeesti en UK, volontuli por TEJO, kancermalsana homo, malkrokodilu, facillingvigi tekston, mia poŝtaĵo montiĝis evereste, venu esperantumi kaj amikumi. Povas nin konsoli, ke antaŭjuĝoj ekzistas ankaŭ kontraŭ aliaj lingvoj, precipe neeŭropaj, eĉ kontraŭ la ĉina, en kiu estis verkataj verkataj majstroverkoj jam en la tempo, kiam la franca kaj angla lingvoj ankoraŭ ne ekzistis.

La dimanĉa parto de la seminario estis dediĉita al demandoj kaj diskutoj.

Miroslav Malovec



Preleganta Claude Piron

Al la legantoj
de
STARTO
Piron
= PIRON

Ing. RNDr. Václav Vanc el Ústí nad Labem sendis al 18 institucioj leteron rekomendantan okupigi pri Esperanto. Sep el ili respondis. La plej interesajn ideojn ni prezentas:

Lingvolernejo en Prago (Národní 20):

Bedaŭrinde la orientiĝo de nia lernejo celanta la studadon de unuopaj lingvoj kaj kompreno de la koncernaj civilizoj per ili kaj inverse, t.e. kompreno de konkreta lingvo en ĝiaj subtilaĵoj donitaj de la civiliza evoluo, estas alia ol instruado de civilize neŭtrala komunikiilo. Per tio ni neniel volas subtaksi la signifon de Esperanto, precipe en la nuna tempo, kiam necesas iel kontribui al rapida kaj facila interkompreniĝo de la homoj en la tuta mondo.

Filozofia fakultato de la Karla Universitato:

La katedro de lingvoj estas direktita al speciala studado de la faka esprimado en la mondlingvoj. Esperanto kiel subjekto de nia intereso estus konsiderinda nur tiam, kiam ĝi fariĝus la lingvo de la scienco.

Ministerio de komerco kaj turismo de Ĉeĥa Respubliko:

La ĉefa objekto de agado de nia ministerio estas la problemaro de la enlanda komerco kaj turismo, do ni ne estas klerigejo. En la kadro de agado de nia ministerio ekzistas ja Instituto de la komerca edukado Praha, kiu plenumas funkcion de eduka-kleriga lernejo por la bezonoj de la ministeria agadkampo. Apud fakaj aranĝoj ĝi

realigas ankaŭ instruadon de fremdaj lingvoj. Kun instruado de Esperanto oni aktuale ne kalkulas.

Ministerio de lernejoj, junularo kaj korp-ekzercado de Ĉeĥa Respubliko:

En la elementaj kaj mezaj lernejoj povas estiĝi iniciate de la membroj de via organizo kaj post interkonsento kun lernejestro interesrondoj de lernantoj por instruado de Esperanto. La lernejestro rajtas proponi por tiu ĉi agado ĉambrojn en la lernejo.

Tiusence ni jam respondis en aprilo 1990 al s-ro ing. JUDr. M. Tůma el Rybí, distrikto Ústí nad Labem, kiu ankaŭ demandis pri eblo establi katedron de Esperanto en la Silezia universitato. La eblo de fondado de interesgrupoj en la elementaj kaj mezaj lernejoj daŭras plu. La ministerio atentigos la lernejojn en la Instruista Gazeto (Učitelské noviny).

Ĉeĥoslovaka televido:

La ideo krei kaj prezenti sur la ekranu kurson de Esperanto aperis ĉe ni jam plurfoje ekde 1965, kaj se ĝi ne estis realigita, do tial, ke la antaŭ-enketado montris nesufiĉan nombron de interesitoj, kiuj regule sekvus la kurson. La televida elsendo estas efektiva nur en momento, kiam la nombro de spektantoj atingas kelkcent mil. En la sfero de lingvokursoj ni estas gvidataj de la ministerio de lernejoj, junularo kaj korp-ekzercado, kiu partoprenas ilian preparon fake kaj finance. Nuntempe ni elsendas plurajn kursojn de la angla, franca, kaj germana lin-

gvoj, al kio gvidas nin precipe la praktikaj interesoj prepari niajn studentojn kaj civitanojn por multiĝantaj politikaj, ekonomiaj kaj kulturaj kontaktoj kun la okcidentaj landoj. En la plej proksima tempo ni preparas la kurson de la hispana kaj de la jam delonge postulata de instruistoj latina lingvo, kiu estis dum la lasta jarkvardeko intence limigata, kvankam ĝi prezentas necesan ekipon por altlernejanaro de ĉiuj humanismaj fakoj kaj samtempe estas de la pedagogoj opiniata kiel eminenta propedeŭtiko de ĉiuj eŭropaj lingvoj - do ankaŭ de Esperanto. Tiujn praktikajn vidpunktojn ni ne povas ignori kaj ni ne povas pretervidi la milojn da spektantoj, kiuj montris sian intereson per aĉeto de akompanaj tekstoj kaj lerniloj. Tiu preferado ne estas nia ideo nek ĝi estas memcela. Je unua vido vi povas vidi, ke temas pri lingvoj, kiuj estas agnoskataj kiel komunikaj de ĉiuj mondaj institucioj komencante de UNO.

Mi permesas al mi reveni al la fino de via letero. Al ni ne mankas komprenemo, bona volo, kuraĝo nek persistemo. La malamikojn ni ne timas, sed ni devas konsideri la financajn rimedojn, kiujn ni posedas je nia dispono. Ne nur al vi, sed al plejparto de la spektantoj mankas konkreta imago pri la elspezoj por tia kurso. Mi certigas vin, ke unu solan lecionon de iu ajn lingva kurso ni ne kreos sub 60.000 Kčs. Por ke la kurso havu sencon, necesas almenaŭ du serioj da lecionoj, por komencantoj kaj por progresintoj. Ĉiu kun 25 lecionoj. La problemo certe malgrandiĝus, se vi povus rekomendi al ni ankaŭ solvantan sponsoron.

HEREDIGO DE KOMENIO KAJ EDUKO DE LA HOMO POR LA 21-A JARCENTO

estas titolo de internacia konferenco, kiun organizis Karla Universitato en Prago kaj Universitato Komenio en Bratislava en la tagoj 23.-27.3.1992. La traktado okazis en 7 sekcioj:

- Eduko por la 21-a jarcento;
- Rajto de infanoj kaj evoluo de personeco;
- Materialaj kaj didaktikaj rimedoj en kunteksto kun informa teknologio;
- J.A.Komenio pri la antaŭlerneja edukado kaj lia heredigo por la nuntempo;
- J.A.Komenio kaj signifo de lingva kaj literatura kleriĝo;
- J.A.Komenio k. "res humanae";
- J.A.Komenio kaj lia heredigo en la agado de eklezioj.

Partoprenis ĉirkaŭ 1200 personoj, en la inaŭguro ankaŭ la prezidento Václav Havel. En la tria kaj kvina sekcioj prelegis ankaŭ esperantistoj el AIS San Marino, sed angle. **V.Barandovská kaj V.Novobilský:** Internacia Akademio de Sciencoj kaj Internacia Lingvo kiel Koncepto de Komenio kaj ĝia Realiĝo en AIS San Marino; **H.Frank:** Rezultoj de Psikokibernetiko pri lernado de ILo; **H. Frank kaj M.Lánský:** Perkomputila Leksika Gramatiko bazita sur la Ideoj de Komenio, Zamenhof kaj De Saussure; **H.Frank:** Eduka Kibernetiko - Enhavo kaj Evoluo dum la lastaj dudek jaroj.

(laŭ V.Novobilský)

AIS San Marino okazigis fine de marto 1992 en Brandýs nad Orlicí **Sanmarinecan Universitatan Sesion**, kies agadon ĉeestis okdeko da personoj. Inter aliaj aperis ankaŭ prelegoj pri Komenio kaj liaj instrumentoj (Barandovská, Vojáček).

INTERNACIA LINGVO DE DOKTORO ESPERANTO DUM KOMENIOLOGIA KONFERENCO EN PRAGO 1992

Esperantistoj ne estos surprizitaj per la titolo, ĉar pri internacilingva projekto de Komenio oni jam multfoje aŭdis kaj inter la packreaĵ ideoj de Komenio kaj Zamenhof ja estas ankaŭ simileco.

Por festi 400-jaran naskiĝ-jubileon de la ĉeĥa pedagogo, filozofo kaj teologo kunvenis en Prago dum la lasta marta semajno 1992 ĉirkaŭ 1500 sciencistoj el la tuta mondo por prelegi kaj diskuti pri ĉiuj flankoj de la komenia verkaro. Por ni estas aparte interesa, ke unu el la konferencaj sekcioj kunorganizis ankaŭ Akademio Internacia de la Sciencoj San Marino, kiu uzas zamenhofan lingvon kiel oficialan. Kvankam ĝi ne estis oficiale aprobita lingvo de la praga komeniologia konferenco, multaj ĉeestantoj deziris ĝin aŭdi, tiel okazis kelkaj prelegoj rekte en Internacia Lingvo kun paralela traduko en la ĉeĥan. AIS prezidanto OProf. Dr. Helmar Frank ne nur prezidis la trian sesion de komeniologia konferenco, kie li prelegis pri evoluo de klerigkibernetiko, sed kun OProf. Miloš Lánský gastiĝis en lingvistika sekcio por paroli pri komputila gramatiko bazita sur ideoj de Komenio, Zamenhof kaj Saussure, kaj en eduka sekcio por priskribi du interesajn ideojn de Komenio, nome pri internacia lingvo kaj internacia kolegio.

Krome partoprenis la konferencon aliaj membroj de AIS, precipe ĉeĥaj klerigkibernetikistoj Prof. Vlastimil Novobilský kaj ADoc Věra Barandovská prelegis en lingvistika sesio

ankaŭ pri realigo de internacilingvaj ideoj de Komenio en AIS San Marino. Dum la diskuto kaj eĉ ekster la prelegejo aŭdiĝis demandoj kaj rimarkoj pri internacia lingvo de Zamenhof kaj montriĝis, ke multaj komeniologoj jam estas informitaj almenaŭ pri ĝia ekzisto. Komenio certe ne ĝojus pro la oficiala nomo de la Praga konferenco en la angla **Comenius Heritage and Education of Man for the 21st Century** kaj pri lingva Babelo de ne ĉiam perfektaj tradukistoj. Sed li almenaŭ povus esti kontenta, ke oni parolis novepokan neutralan internacian lingvon ne nur neoficiale dum la konferenco mem, sed la sekvantan semajnon tute oficiale dum la unua ceha studadsesio de AIS, kiun kunorganizis Karla Universitato en Prago

A Doc. Věra Barandovská

UNUA ĈEĤA STUDADSEKIO DE AIS

Akademio Internacia de la Sciencoj San Marino pli kaj pli enradikigas en la "orientaj" landoj. Jam pasintjare ĝi eniris kontakton kun Karla Universitato en Prago. La kontrakton pri kunlaboro de AIS kaj Karla Universitato pozitive aprezis ankaŭ la ceha lernejministro Petr Vopěnka. La unuaj paŝoj al kunaktivado de AIS kaj katedro de klerigteknologio (pedagogia fakultato de Karla Universitato) estis la komune organizitaj kvara konferenco pri kibernetika pedagogio en Prago en aŭgusto 1991 kaj la klerigkibernetika sekcio de internacia konferenco "Comenius 92" en marto 1992. Komence de aprilo 1992 okazis la unuaj gastprelegoj de AIS-profesoroj en Karla Universitato. Por vintra semestro

1992-93 estas planitaj pluaj gastprelegoj kaj universitataj kursoj.

Unuan ĉeĥan studadsesion de AIS, organizitan en kunlaboro kun Karla Universitato en ties lernejo Brandýs nad Labem 1992-03-27 - 04-04, ĉeestis okdeko da partoprenantoj el 12 landoj. Okazis prelegserioj kaj kursoj en ĉiuj ses sesioj (ki-bernetiko, humanistiko, struktursciencoj, filozofio, natursciencoj kaj morfosciencoj), amase vizititaj estis ekz. "Ĉifrado kaj ĝia rolo en la nova komunikado" de PDoc. Dr.Habil. Fösmeier, "Malgrandaj ĝermanaj lingvoj" de ADoc. Dingeldein, "Aŭtomata traktado de natura lingvo" de OProf. Minnaja, "Estetikaj ecoj de la vivo" de OProf.Bociort ktp. Krome aŭdiĝis trideko de liberaj prelegoj kaj koncizprelegoj, kaj kvin membroj de AIS adapte adoptis sian nacian sciencon gradon ĉe AIS. Dum la sesio kaj ekzamenoj ĉeestis ankaŭ reprezentantoj de Karla Universitato, kiuj poste ekzamenis kaj aprobis la ekzamenrezultojn kaj promesis malfermi registron de la aprobitaj kaj en Ĉeĥoslovakio uzeblaj gradoj ĉe Karla Universitato.

En espero de plue disvolviĝonta kunlaboro disponigis Karla Universitato al AIS oficejon en Prago.

ADoc. Věra Barandovská



KOREKTO

rilate al unu tradukinto

En STARTO 2/1992, p.9, estas menciite, ke Tomáš Pumpr por la nacilingva programo de la radiostacioj Praha kaj Ostrava enĉeĥiĝis la nederlandan dramon "La mondo ne havas aten-

dejon" de M. Dekker el esp. traduko de F.Faulhaber.

Tio estas misinformo, ĉar la dramon proprainiciate tradukis tiam elstara esperantistino Drahomíra Chlubnová el Brno kaj proponis ĝin al Ĉs. radio Praha. Tiu akceptis la proponon kaj elpostulis lingvan kontrolon de la traduko ĉe d-ro Tomáš Pumpr. Okaze de la radia prezento estis erare menciita kiel tradukinto nur d-ro T.Pumpr. En la Historio ... /S.Kamarýt, p.150/ estis kiel tradukinto, post la verkontrolo, menciita D. Chlubnová.

Ing. J.Werner

ESPERANTO KIEL KOMERCA LINGVO!

Jam en 1986 la komerco-ĉambro de la Meuse en Francio eldonis en Esperanto inventaron de la lokaj industriproduktaĵoj. En 1992 tiu ŝtatofico denove uzas la internacian lingvon Esperanto komune apud la franca, angla kaj germana lingvoj. La 45 unuaj paĝoj prezentas kvarlingvajn informojn pri turismo, ekonomio ktp. Tiu iniciativo estas grava por la disvastigado de la internacia lingvo Esperanto sur las kampo de la komerco. Ĉiuj interesitoj povos ricevi unu ekzempleron de la inventaro kontraŭ sendo de 10 internaciaj respond-kuponoj (aŭ samvalorajo) al la adreso: **CHAMBRE DE COMERCE DE LA MEUSE, parc Bradfer, F 55000 BAR LE DUC, Francio**

Sinjoro Gilbert, direktoro de la komerco-ĉambro, devas esti kapabla pruvi al ĉiuj skeptikuloj, ke Esperanto indas por roli en tiu sfero. Por atingi tiun ci celon li bezonas ankaŭ reagojn de legantoj de Starto.



PRI FAMAJ HOMOJ

E.V.Tvarožek: *Anekdotoj pri famaj homoj* (Historietoj el la historio). Poprad, E.-Centro de SEA 1992, 64 p.

Nova esperanta libro ne aperas ĉe ni ĉiutage. Des pli ni bonvenigas ĉi tiun, la plej novan. Kia ĝi estas? Simple:

BELA, INTERESA, AMUZA, UTILA.

Ĉi tiuj kvar pozitivaj adpektivoj sendube apartenas al ĉi tiu libreto enhavanta 119 anekdotojn pri 70 famaj homoj el la tuta historio de la homaro. Sed pli detale:

BELA

La broŝureto estas vere bela tuj je la unua rigardo. Verda koloro, simpatia poŝformato, bona papero, belaj bildoj, elstara grafika aranĝo, bildbukeado sur la kovrilpaĝo. Tio ĉio kreas la belecon de la libreto, kiu certe ne malbeligos vian esperantan bibliotekon.

INTERESA

La enhavo estas tre interesa. Spritaj, longatempe per la aŭtoro elektitaj anekdotoj el

la tuta historio de la mondo - tio interesas ĉiun infeligitan homon, pliriĉiĝas lian kulturan horizonton. La intereseco estas ankaŭ en la originaleco, noveco de la anekdotoj. Estas inter ili multaj ne tro konataj kaj disvastigitaj, ne polvokovritaj. Unuvorte kaj simple: interesa por junaj kaj oldaj!

AMUZA

Kion signifas amuzo? Bonan senton ĉe la legado, prezantado, pripensado, cerbumado. En la libreto la amuzo estas en ekvilibro kun la aliaj trajtoj. Mi tre bone amuziĝis ĉe la unua legado de la broŝuro kaj mi estas konvinkita, ke tion ĝuos ĉiuj ĝiaj legantoj, kiuj certe multfoje revenos al ĝi.

UTILA

La utileco de la libro estas multeflanka. Precipe vi povas ĝin porti ĉe vi dum vojaĝado kaj kiam ajn ĝin eltiri el la poŝto kaj mallongigi al vi la tempon. Tio estas ankaŭ la plej bona okazo por ellerni la anekdotojn parkere por pliperfektiĝi kaj povi prezenti ilin al aliaj. Laŭ mia sperto kaj laŭ sperto de multaj aliaj homoj parkera lernado estas la plej bona rimedo por ekregi la lingvon! Oni povas uzi la libreton en kursoj. Ne nur por legi kaj traduki, sed ankaŭ por aranĝi malgrandajn teatrojn kun du personoj, kiuj rolas en ĉiuj anekdotoj. Vi estos surprizitaj, kiel bone vi amuziĝos kaj kiel rapide vi ellernos la anekdotojn dum viaj kursoj kaj klubaj kunvenoj. Kaj fine - la deklamado de la anekdotoj vi povas eluzi ĉe diversaj konkursoj kaj kulturaj aranĝoj.

Do, karaj legantoj, ĉu sufiĉas por konvinki vin, ke vi tuj ekhavu ĉi tiun multevaloran libron por via biblioteko?

Ivan Slávik

JOSEF RUMLER-70

La 20-an de julio 1992 festos sian 70-jariĝon la eminenta ĉeĥa poeto, eseisto, tradukisto kaj eldonisto, verkanta ankaŭ en Esperanto, Josef Rumler. La literatura revuo Fonto dediĉis al li specialan numeron (novembran, n-ro 131/1991).

En la ĉeĥa literaturo li estas konata per kvar poemkollektoj: *Elportado de violono (Vynášení houslí, 1970)*, *Taso de la matena lakto (Hrnek raního mléka, 1973)*, *Ascendo sur la monton Říp (Výstup na horu Říp, 1978)* kaj *Matena melkado (Ranní dojení, 1987* - aperis paralele ĉeĥe kaj Esperante en unu volumo). Pri la ĉeĥa verkisto Jaroslav Havlíček, kies verkaron li preparis por eldono, Josef Rumler verkis monografion *Epikisto J. Havlíček (Epik J.H., 1973)*. Kiel eldonisto li aperigis ankaŭ verkojn de J.Čarek, J.S.Baar, V.Rakous, K.Havlíček-Borovský, K.H.Mácha, R.M.Rilke, P.Bezruč kaj M.Isakovskij. El la pola literaturo li tradukis verkojn de S.Zeromski, H.Sienkiewicz, A.Strug, J.Pytlakowski kaj M.Dabrowska.

Josef Rumler fariĝis esperantisto en 1978 kaj tuj komencis tradukadi el la ĉeĥa literaturo. Kvankam kontraŭ liaj unuaj provoj aperis akraj protestoj, precipe pro uzo de multaj neologismoj, li pruvis sian majstrecon ankaŭ per multaj tradukoj en la klasika Esperanto. La skandaletto pro lia eseo *Abunde kaj redunde* (1986) estis kaŭzita fakte pro neologisma vortareto aldonita sur la lastaj paĝoj, ne pro la eseo mem, en kiu li prove uzis nur dudekon da ili, kaj kiun multaj furiozaj kritikantoj eĉ ne legis. Sian tradukarton li prezentis al la esperantistaro en dulingva broŝuro **52 nuntempaj**



ĉeĥaj poetoj en 1000 versoj (Prago 1989) kaj prezentas ĝin ankaŭ en la jam menciita speciala numero de Fonto (el Halas, Kundera, Sýs, Žáček). Sed Fonto alportas ĉefe liajn originalajn poemojn akompanatajn de desegnoj de Ota Janeček. La 22 poemoj tuŝas diversajn temojn (ekz. **El la ĉasdistrikto, Keltoj en Bohemio, Festotago de mortintaj animoj, El la anatomio**). Alian lian originalan poemon **Lasta ĉevalo**, kiu jam en 1985 aperis en Kvarfolio, rememorigas la proza konfeso **Viva modelo de mia Pegazo**, en kiu la poeto esprimas sian amon al ĉevaloj, precipe al tiuj de Kladruby. En la eseeto **Pri mia Esperanta poetiko** li klarigas sian tradukmetodon evitantan la eliziadon de la substantiva finaĵo. Per tri pecoj kontribuis ankaŭ liaj poetaj geamikoj, Eli Urbanová kaj Jiří Karen.

-red-

KULTURA FESTIVALO EN ÚSTÍ NAD LABEM

Jam tradicia kultura festivalo en Ústí nad Labem okazos ĉijare en la tagoj de la 2-a ĝis la 4-a de oktobro 1992: vendrede societa vespero, sabate kulturvespero omaĝe al naskiĝdatrevenoj de J. Kořínek kaj d-ro Tomáš Pumpr. Sabate kaj dimanĉe matene turismaj ekskursoj al banurbo Bilina kaj al Litoměřice. Tranoktado en dultaj ĉambroj en entreprena loĝigejo de Spolchemie Ústí n. Labem.

Pluaj detalaj informoj ĉe la aliĝadreso: Ing. Josef Kříž, Družstevní 411/11, 400 07 Ústí nad Labem (limdato por aliĝontoj: 09-20).

ESPERANTO EN KOMERCO

Privataj komercistoj, studentoj de komercaj lernejoj, se vi havas intereson pri kunlaboro kaj inteŝanĝo de spertoj kun esperantistoj de komerca lernejo en Francio, skribu al la adreso: Pavel Polnický, Příčná 150/VI, 290 01 Poděbrady.

* ESPERANTO-MUZEJO * EN ĈESKÁ TŘEBOVÁ

S-ano Pištora sukcesis akceptigi en nova muzeo de Ĉeská Třebová ankaŭ ĉambron por ekspozicio pri Esperanto. proponojn de materialoj sendu al la adreso: Cilka Kotyzová, Drobného 1112, 560 02 Ĉeská Třebová (kiu estas ankaŭ la adreso de la klubo "Amikeco").

INFORMILO POR INTERLINGVISTOJ, eldonita de CED, reaperos sub redakto de d-ro Detlev Blanke laŭbezone kaj en modestaspekta formo. Ĝi celas peri informojn pri la plej gravaj interlingvistikaj aranĝoj, publicaĵoj iniciatoj kaj planoj. Interesiĝantoj mendu ĝin ĉe UEA.

KOMERCAJ REKLAMOJ EN STARTO:

tuta paĝo 2500 Kčs,
duonpaĝo 1500 Kčs,
kvaronpaĝo 800 Kčs,
1 linio en kolumno: 25 Kčs.
Ripetita anonco ĉe samtempa mendo en du numeroj ricevos 15% da rabato, en tri aŭ pluraj numeroj 30% da rabato.

16-A INTERNACIA JUNULARA FESTIVALO EN LA SALLE

Ĉi-jare okazis IJF norde de Italio, en ĉarma alpa regiono Valle d'Aosta, konkrete en la pitoreska urbeto La Salle en la tagoj 1992-04-15/21.

Italio nin bonvenigis per suno kaj florantaj herbejoj, ĉie regis vera printempa etoso. Ĝi baldaŭ ekregis ankaŭ nin, preskaŭ 200 esperantistojn el la tuta Eŭropo. Mi migradis en la montaro, ekskursis en ĉirkaŭaĵon, lernis poplajn dancojn, gustumis regionan vinon, bone amuziĝis kun internacia teatra grupo "Fia Kancido" kaj kun magiisto, kelkaj eĉ provis lerni la italan.

Bone elektita estis ankaŭ ĉeftemo - **Eŭropa kuniĝo kaj naciismoj** - ĉar tiu demando hodiaŭ signifas aktualan problemon.

Kaj kion aldoni? Nur unu afero min malĝojigas, kiam mi rememoras la semajnon, dum kiu mi 24 horojn tage povis esti inter geamikoj: ĝi pasis tiel rapide! Preskaŭ kiel unusola tago.

Blanka Gruntová

Monda frataro .
estas Internacia koresponda kaj hobia adresaro, kiun proponas esperantistoj el Liberec. Informojn petu ĉe R.J. Zvěřina, p.s. 5, 460 02 Liberec, tel. 048/26561. *****

La 19-an de februaro 1992 jarkunvenis EK Přerov. Partoprenis 31 partoprenantoj, inter ili gastoj el kunlaborantaj E-kluboĵoj el Ostrava, Olomouc kaj Prostějov.

E-klubo en Přerov fine de jaro 1991 havis 49 membrojn. Pro ekonomiaj problemoj la klubo dum februaro 1991 forlasis la klubejon de Spartak kaj transloĝiĝis al faklernejo, kie klubanoj kunvenas ĉiun merkredon je la 18-a horo. En oktobro 1991 rekomencis progresiga kaj konversacia kursoj. La klubo prizorgas du informajn monstrokestetojn en la urbo.

Sub lerta gvido de la prezidanto Ludvík Chytil klubanoj aktive partoprenas ne nur klubajn vesperojn kaj agadojn, sed ankaŭ diversajn renkontiĝojn enlande kaj eksterlande. Kelkaj membroj ekzemple helpis dum la 43-a IFEF-kongreso en Olomouc (1991), la prezidanto prelegis en Poděbrady kaj Gliwice en Pollando. Geedzoj Filip funkciis kiel instruistoj dum la Somera E-tendaro en Lančov. Jindřich Tomášek krom siaj devojn en Fervojista sekcio ĉe ĈEA kontribuis al diversaj, precipe fakaj porfervojistaj gazetoj kaj aperigis en ili dum 1991 pli ol kvardek artikolojn. La klubo en Přerov krom la kunlaboro kun E-kluboĵoj en Ostrava, Olomouc kaj Prostějov ofte gastigas E-gastojn, ekzemple lastjare el Pollando, Danlando kaj el Germanio.

Omaĝe al 400-a datreveno de la naskiĝo de Jan Amos Komenský en aprilo la klubo kun Fervojista Sekcio de ĈEA organizis sukcesan **Printempan renkontiĝon** en Přerov, kiun partoprenis krom enlandaj samideanoj ankaŭ gastoj el Aŭstrio, Hungaroj kaj Poloj.

Jindřich Tomášek

Radio Praha, elsendo "Domino", elsendis 1992-03-20 posttagmeze intervjuon kun Jaroslav Mařík pri J.A.Komenský, lia ideo de internacia lingvo kaj pri Esperanto speciale. Krome estis menciitaj la iamaj Esperanto-elsendoj de "Verda stacio" kaj iliaj artprogramoj. Muzika enmetaĵo, ario el "Najado" de Antonín Dvořák en Esperanto, prezentita de Marie Tauberová, montris la kantopovon de la internacia lingvo, kion sekvis ĉeĥa kanzoneto pri Esperanto-kurso.

PRI KOMENIO EN E-GAZETOJ

Univ. prof. Giordano Formizzi (Verona, Italio), aperigis sur 33 paĝoj de la speciala numero de "l'esperanto" - oficiala organo de Itala Esperanto-Federacio itallingvan traktaton "*La lingua pansofica di Comenio*".

Artikolojn en aliaj gazetoj pri Komenio kaj lia ne nur teoria, sed parte ankaŭ praktika laborado por la kreo de internacia planlingvo, iniciatis s-ano Jaroslav Mařík. Li disendis al kelkaj niaj kaj eksterlandaj gazetoj sian memrandon kaj fotokopion de traktato de univ. prof. J. Hendrich: "Artefarita lingvo laŭ J.A.Komenio", verkita surbaze de la ĉefa fonto *Panglotia*. Krom aliaj utiligis ilin Esperantisto Slovaka, Uĉitelské noviny (Instruista gazeto), Ruslanda Esperantisto kaj kelkaj klubaj gazetoj kaj bultenoj (ekz. Benešov, Třebíč, Brno, Nová Dubnica). Ruslanda Esperantisto mendis ĉe Jaroslav Mařík apartan artikolon pri Komenio.

●●●●●●●

Ĉu mortis profesoro J. Kohen-Cedek?

Kiam mi ricevis dum la lasta Kristnasko lian novjaran bondeziron, neniu en nia kontinento ankoraŭ sciis, ke la skribinto jam ne vivas. Jes, nekredibla estas por mi sciigo en la januara numero de "Esperanto", ke la 87-jara granda esperantisto mortis la 21-an de decembro en Jerusalemo.

En mia cerbo svarmas ĥaosecentoj da rememoroj al tiu ĉi eksterordinara impona persono. En granda skatolo mi konservas liajn multpaĝajn leterojn (eble mi povas nomi ilin eseoj), kiujn mi ricevis de li dum pli ol dudekjara periodo. Ili temis pri malnova kaj nuntempa juda historio kaj politiko, pri liaj interesaj prijuĝoj pri kristanismo, kiuj estis fonditaj surbaze de lia studado de latinlingvaj originalaj ekleziaj verkoj, pri lia laboro por Esperanto-movado ekde lia persona renkontiĝo kun Zamenhof ĝis eldono de lia (hodiaŭ jam mondfama) Antologio de hebrea poezio, kies unuopajn versojn mi admiris pli frue ol ili estis presitaj. Vere interesa kaj oferema estis lia kunlaboro kun mia filino pri historio de eksterlandaj civitoj Lidice.

Kiu scias, kiom da lingvoj li scipovis? Inter ilin aparte nian ankaŭ la ĉeĥa lingvo, malgraŭ ni neniam uzadis ĝin dum nia leterado. Sed li diligente studis niajn ĉefajn historiajn verkojn, poeziaĵojn, prozaĵojn. Lia neordinara intereso celis al pragaj judaj verkistoj, nome al Kafka, Rilke, Werfel. Pri Nĕmcová, Jirásek kaj aliaj li sciis pli multe ol iu ajn nia mezlerneja profesoro.

Kiel juna universitata studento en Berlino li ofte vizitadis nian ĉefurbon, unufoje li renkontiĝis ankaŭ kun nia unua prezidento T.G.Masaryk kaj por li estis neniam forgesebla ilia

diskuto pri judaj problemoj. Lia lasta vizito de nia lando efektiviĝis en sesdekaj jaroj, kiam li serĉis (helpe de ĉeĥaj esperantistoj) sendanĝerajn kontaktojn kun sovetaĵ judoj. Mi povas fiereti, ke mi aktoris etan rolon de ĉenero en kontrabando de hebreaĵ studlibroj kaj vortaroj por rusaj judoj, kiun li organizis.

Mi ne kapblas elnomi ĉiujn okazintaĵojn, kiuj kunligis nin. Tial neniu diru al mi, ke li jam mortis. Por mi li vivas, li vivos plu.

Jaroslav Žák, Opava

JAPANOJ KONGRESOS EN MATUSIMA

En la hotelo Taikansoo en Matusima apud la urbo Sendai okazos (1992-08-29/30) la 79-a Kongreso de japanaj esperantistoj. Vere enviinda nombro de naciaj kongresoj en enviinda loko! Ĉar Matusima - "pinarbaj insuloj" - estas ĉemara turis-mejo kun pitoreskaj insuloj kaj historigravaj temploj. Tradicie rigardata kiel unu el la tri plej belaj pejzaĝoj en Japanio, ĝi fariĝis temo de klasikaj literaturaĵoj, kiel tiu de Basyoo (17-a jarcento), la majstro de hajko.

La kongresa hotelo situas sur mardobordo kaj insuloj. Scivolemuloj trovos Sendai 350 km norde de Tokio. Kaj vojaĝemuloj povos partopreni la kongreson por 3 mil enoj (kongresa kotizo) kaj 8,5 mil enoj (loĝado kaj manĝo). Multajn sukcesojn, japanaj gekolegoj!

oooooooooooooooooooooooooooooooooooo

La libron de E.V.Tvarožek, **Anekdotoj pri famaj homoj**, kies recenzon de Ivan Slávik ni publikigas sur la kontraŭa paĝo, membroj de SEA/ĈEA povas aĉeti por nuraj 28 kronoj ĉe la sekretariejo de ĈEA en Prago aŭ rekte ĉe Esperanto-Centro de SEA en Poprad aŭ mendi por la sama prezo plus sendokostoj.



INTERNACIA ESPERANTO-KLUBO AŬTOBILISTA - IEKA
KOMENIUS KAJ INTERLINGVISTIKO
EN STRÁŽNICE

John-Amos Comenius

Esperanto sekcio de Asocio de ĉeĥoslovakaj filatelistoj, kunlabore kun Filatelia klubo "Slovácko" Hodonín kaj Esperanto klubo ĉe Kulturdomo "Strážničan" en Strážnice, iniciatis Internacian E.-filatelan ekspozicion "**Comenius kaj interlingvistiko en filatelo**" 1992-07-25 - 08-02 en sudmoravia urbo Strážnice, distr. Hodonín. Jam 03-30 kaj 04-06 uzadis loka poŝtoŝtampo porokazan afrankstampilon, kiu propagandas la ekspozicion - vidu la suban bildon. Ankoraŭ oni uzos ĝin ĉe poŝtoŝtampo Hodonín 1 dum tagoj 04-06, 04-30, 06-01 kaj 07-31. Intertempe, dum tagoj 05-04 kaj 05-29 ankaŭ ĉe poŝtoŝtampo Veselí nad Moravou, distr. Hodonín. Demandojn pri detaloj skribu al adreso: **ESPERANTO, poŝtkesto 34, 696 62 Strážnice**

Vladislav Hasala



INTERNACIA ESPERANTO-KLUBO AŬTOBILISTA - IEKA

Ekde aprilo 1992 IEKA havas en Ĉeĥoslovakio novan landan reprezentanton: **Miroslav Severa** (lia adreso: Lukostřelecká 2188, 470 01 Česká Lípa).

Retrospektive ni konstatu, ke la estraro de ĈEA konfirmis nian agad-partoprenon en IEKA jam en 1973-05-10. Landa reprezentanto de tiam estis inĝ. Jan Werner el Brno. Al IEKA aliĝis el nia lando sume 32 membroj.

La aktivado de IEKA entute estas tre modesta, bedaŭrinde, precipe post dufoja forpaso de ĝia sekretario. Jean Guillaume mortis 1985-03-20 kaj René Bastong estis mortvundita per terorista bombo sur Pariza trotuaro kaj mortis 1986-11-06.

Kiu el vi deziras konatiĝi kun la organizaĵo kaj instigi ĝin al pli vigla kaj utilon-alporta ekzisto, skribu al nia nova landa reprezentanto kaj partoprenu la kunsidon de IEKA dum la UK en Vieno.

we

Interesaj specioj de fiŝoj **

Niaj akvariistoj bredas multajn ekzotikajn speciojn de fiŝoj. Pri iliaj vivmanieroj ni spertis multajn, ofte eĉ surprizajn faktojn.

Ĉu vi jam aŭdis, ke ekzistas fiŝoj, kiuj povas droni? Tio estas fiŝoj de familio anabaseoj. Ili havas aliokaze branĵojn al spirado, sed krom tio ili havas ankoraŭ specialan spir-organon, nomatan labirinto. Pere de ĝi ili povas spiri atmosferan oksigenon kaj sekve de tio vivi en akvoj malriĉaj je oksigeno. Kiam ili ne povas naĝi al la nivelo, ili dronas.

Maniero de frajado ĉe fiŝoj estas diversa. Plimulto de niaj fiŝspecioj lasas sian frajon al la fatalo. Iuj niaj kaj multaj akvariaj fiŝspecioj gardas sian frajon. En kio konsistas ĉi tiu gardado? Per naĝiloj maturaj fiŝoj sanĝas akvon ĉe frajo, forigas malbonajn ovojn kaj defendas la frajon. Ĉi tiuj fiŝoj frajas sur diversajn objektojn en akvo, ekzemple sur foliojn de plantoj, ŝtonoj ktp., en faritajn produdajetojn en sablo, iuj faras diversajn nestojn. Iuj de ĉi tiuj fiŝoj gardas nur frajon, aliaj ankaŭ fiŝidojn. Dum la tago fiŝidoj naĝas preter maturaj fiŝoj, nokte ili dormas en profundajeto en sablo. Ĉe iuj fiŝspecioj gardas frajon masklo, ĉe aliaj femalo, ĉe aliaj ambaŭ gepatroj. Diversajn tiajn manierojn de frajado havas fiŝoj de familio cihletoj, en profundajetojn en sablo frajas fiŝoj de familio centrarĥedoj. Iuj fiŝspecioj de la menciita familio anabaseoj frajas tiamaniere,

ke masklo faras en la akvonivelo ŝaŭman neston, en kiun ambaŭ gepatroj frajas. Masklo gardas frajon kaj malgrandajn fiŝidojn ĝis eknaĝado.

Ĉe familio de gasterosteoj, el kiuj ĉe ni vivas tri-dorna gasterosteo, masklo faras el restoj de plantoj malgrandan neston, en ĝin frajas kun iom da femaloj, kaj poste ĝin gardas ĝis eknaĝado de fiŝidoj. Ĉe iuj specioj de familioj cihletoj kaj anabaseoj masklo aŭ femalo prenas frajon en sian buŝan kavon, tie ĝin havas ĝis eloviĝado. Ĉe tio ĝi ne voras.


Eloviĝantaj fiŝidoj dum iu tempo naĝas proksime de masklo aŭ femalo kaj en danĝero kaŝas sin en ĝian buŝan kavon. Tute originale frajas fiŝo latine nomata *Copella arnoldi* de la suda Ameriko. Ĝi frajas ne en akvon, sed sian frajon ĝi metas sur foliojn de plantoj kreskantaj super la akvonivelo, en akvario frajas sur kovranta vitron.

Plimulto de fiŝspecioj frajas tiamaniere, ke masklo kaj femalo liberigas siajn seksajn produktojn samtempe. Ne estas tiel ĉe fiŝo latine nomata *Stewardia riisei* de la suda Ameriko. Masklo generigas femalon kaj ĉi tiu poste metas generitan frajon. Iuj fiŝoj estas vivnaskiĝantaj, masklo generigas femalon kaj ĉi tiu post iu tempo naskas fiŝidojn. Iuj ĉi tiuj fiŝspecioj de familio peciledoj (gupio, ksifoforo ktp.) estas tre konataj.

Normalaj niaj kaj ekzotikaj fiŝoj vivas kelkajn jarojn. Sed en la Suda Ameriko kaj Afriko

ekzistas fiŝoj, kiuj vivas nur kelkajn monatojn, ĉi tiuj fiŝspecioj apartenas al familio ciprinodonedoj. Ili vivas en elsekiĝintaj marĉlaĝetoj, sekve de tio ilia frajo povas elsekiĝi. Kiam en ĉi tiuj marĉlaĝetoj aperas la akvo, fiŝidoj eloviĝas; rapide kreskas kaj maturiĝas, maturaj fiŝoj frajas kaj poste mortas.


En la vivo de fiŝoj estas multaj interesaĵoj, precipe ĉe ekzotikaj fiŝspecioj. Ankorau pli interesaj kaj eksterordinaraj estas multaj specioj de fiŝoj maraj.




Paradizfiŝo kun sia ŝaŭmnesto

VORTARETO:

- anabaso** - lezoun
anabasedoj - lezounoviti
- ciĥlo** - vrubozubec
ciĥledoj - vrubozubcoviti
- centrarĥo** - okounek
centrarĥedoj - okounkoviti
- gasterosteo** - koljuŝka
gasterosteadoj - koljuŝkoviti
tridorna gasterosteo -
 koljuŝka triostna
- pecilio** - živorodka
peciliedoj - živorodkoviti
- gupio** - paví oĉko, gupka
- ksifoforo** - meĉovka
- ciprinodono** - halanĉik
ciprinodonedoj - halanĉikoviti
- frajo** - jikry
fraji - klást jikry
frajero - jikra, rybí vajiĉko



Tridorna gasterosteo kun sia nesto



Gupio, la plej konata vivnaskanta fiŝo

Karel Čapek:

Kial la magiisto en karceru sidis

(El la libro "Naŭ fabeloj" tradukis J. Vondroušek)

Kiam do, kiel vi scias, al kondukis la glora Sidney Hall la arestitan magiiston, estis komencita juĝa proceso pro la ŝtelita kato. Post alta tablo tronis juĝisto Doktoro Korpus Juris, same dika kiel severa. Sur benko de akuzitoj sidis la magiisto kun la katenitaj manoj.

"Leviĝu, kanajlo," ektondris je li Doktoro Korpus. "Ci estas akuzita, ke ci ŝtelis de la reĝo katon Jurka, naskiĝintan en ĉi tiu lando, aĝantan unu jaron. Ĉu ci konfesas, sentaŭgulo?"

"Jes," diris la magiisto mallaŭte.

"Ci mensogulo, latrono," ton- dris la juĝisto, "eĉ ne unu vorton mi kredas al ci. Tion oni devas pruvi. Hej, alkonduku ĉi tien atestantinon, nian serenisman principinon."

Oni alkondukis la malgrandan principinon, por ke ŝi atestu.

"Principidino," pepis dolĉe Korpus, "ĉu ŝtelis ĉi tiu fiulo vian noblan katon Jurka?"

"Jes," diris la principino.

"Jen, fripono," ektondris la juĝisto je la magiisto, "ci estas konviktita! Kaj diru, kiel ci ŝtelis ĝin?"

"Nu tiel," diris la magiisto, "ke ĝi mem falis sur mian kapon."

"Mizerulo, ci mensogas," ek- kriis je li la juĝisto kaj turni- ĝis je la principino per la plej tenera voĉo: "Principidino, kiel tiu krimulo ŝtelis vian plej moŝtan katon?"

"Guste tiel," diris la prin- cidino, "kiel li diras."

"Nun ci vidas, ci rabulo," kriis la juĝisto je la magiis- to, "nun jam ni scias, kiel ci ŝtelis ĝin! Kaj kial, protoka- najlo, ci ŝtelis ĝin?"

Ĉar pro la falo rompiĝis ĝia krureto. Mi prenis ĝin sub la jakon por reĝustigi kaj bandaĝi ĝian krueton."

"Ci abomenulo," abruptis Dok- toro Korpus, "ĉio, kion ci di- ras, estas mensogo! Alkonduku ĉi tien atestanton, la gastej- estron el Straŝnice."

Oni alkondukis do tiun atestanton.

"Hej, gastejo," ekkriis la juĝisto, "kion vi scias pri ĉi tiu krimulo?"

"Nur tion," diris la gastej- jestro, "ke li venis, glora tribunalo, en mian gastejon, eltiris el sub la jako ian ni- gran katon kaj bandaĝis ĝian piedeton."

"Hm," murmuris Doktoro Kor- pus, "eble vi mensogas. Kaj kion poste li faris kun la nob- la besteto?"

"Poste," diris la gastej- estro, "li liberlasis ĝin, kaj la kato kuris for."

"Ha, ci best-turmentanto," bruskis la juĝisto je la magi- isto, "ci liberlasis ĝin, por ke ĝi fuĝu! Kie nun estas la reĝa kato?"

"Eble ĝi kuris," diris la magiisto, "al tiuj lokoj, kie ĝi naskiĝis. La katoj, ni scias ja, tion faras."

"Ha, ci senhontulo," vulkanis la juĝisto, "ci volas nin in- strukcii." "Principidino," li turniĝis denove al la principi- no tenervoĉe, "kiel alte vi taksas vian altestimatan katon Jurka?"

"Mi donus ĝin eĉ ne por duono de la reĝolando," deklaris la principino.

"Jen ci vidas, fripono," ek- tondris la juĝisto je la magi- isto, "ci ŝtelis duonon de la reĝolando. Je tio estas, mize- rulo, mortpuno!"

La principidino ekbedaŭris la magiiston. "Eble mi donus," si rapidis diri, "Jurkan por peceto da torto."

"Kaj kiom kostas, principidino, peceto da torto?"

"Nu," diras la principidino, "el nuksoj ĝi kostas kvinheleoron, el fragoj du kvinheleorojn kaj el kremo tri kvinheleorojn."

"Kaj por kia torto vi donus, principidino, Jurkan?"

"Eble por la krema," diris la principidino.

"Ha, ci murdulo," kriis la juĝisto je la magiisto, "same kvazaŭ ci ŝtelus tri kvinheleorojn. Por tio, kanajlo, laŭ la leĝo ci punsidus tri tagojn en arestejo. Ek en la arestejon, arkifripono, por tri tagoj, krimulo, ŝtelisto, rabisto!" "Kara principidino," li turniĝis denove al la principidino, "mi havas la honoron danki vin pro via saĝa kaj inĝeniera atesto. Transdonu, mi petas, al sinjoro la paĉjo, la plej sindonan saluton de lia plej obeema, plej fidela kaj plej justa juĝisto Doktoro Korpus." ...

TRADUKANTOJ ATENTON!

Starto proponas al tradukantoj du paĝojn por prezenti fragmentojn el tradukoj, kiuj jam ekzistas, sed pro certaj kialoj ankoraŭ ne povas aperi (financaj kialoj ktp.), tamen valoras scii pri ili. La tradukoj devas esti elektitaj el la tradukaĵoj jam finitaj kaj preparitaj por eventuala eldono.

Kiel unua aperas fragmento el Naŭ fabeloj de Karel Čapek en la traduko de Josef Vondroušek. La verko estos libera por eldono post la jaro 1995.

Ankaŭ ni bonvenigos opiniojn de legintoj pri la montraĵoj kaj interesajn ni aperigos.

UK Vieno unuafuje internacia orkestro

Ni ŝatas ludi simfonion de Mozart dum la UK en Vieno kaj serĉas ankoraŭ plujajn orkestranojn. Ĉefe violonojn, aldojn kaj violonĉelojn, plue traversflutojn, hobojojn, klarinetojn, fagotojn. Se vi hazarde konus muzikiston, kiu dezirus kunludi en la orkestro, nepre indiku al ni lian adreson. Skribu al: Thomas Kleemann, Bahnhofstr. 95, D-W-6904 EPELHEIM.

TEATRAĴO DE KAREL ČAPEK JAPANE

La teatraĵoj de Karel Čapek "RUR" kaj "La blanka malsano" aperis en Tokio komence de 1992 en japana traduko de Kei Kurisu en unu volumo (326 paĝoj).

J. Mařík

ĈU VI ŜATAS POP-MUZIKON?

La redakcio de STARTO ricevis unu ekzempleron de kasedo kun pop-kantoj aperigitaj en Germanio. **ESPERANTO** estas titolo de la sonbendo akompanata de malgranda kajero kun ĉiuj kantataj tekstoj prezentitaj de la germana pop-bando **TUTMONDA MUZIKO**. Aŭskultante la kantojn ni nur bedaŭris, ke nia TEAM ne plu daŭrigas prezentadon de siaj kantoj en Esperanto.

La germana kasedo prezentanta muzikon de **Reiner Conrad** ricevis favorajn recenzojn kaj vere ĝi povus ĝojigi aŭskultantojn de pop-muziko. La titolo ekzistas ankaŭ kompaktdiske. Provizore la interesitoj povas akiri la kasedon aŭ kompaktdiskon ĉe **Esperanto-Rok-Asocio**, F-31450 **DONNEVILLE**, Francio. Prezoj estas indikitaj jene: la kompaktdisko por 105 FRF (francaj frankoj) - la kasedo por 70 FRF, kompreneble plus sendokostoj.

Ladislav Královec

Mia ekskurso al Furth im Wald

Kvankam la monataj salajroj de la germanaj kaj ĉeĥoslova kaj laboruloj estas preskaŭ samaj (3 mil DM/Kĉs), la interŝanĝa kurso, 1DM = 20 Kĉs, kaŭzas, ke ni devas en Germanio pagi ĉion 20-oble pli multekoste. Tio taŭgas por ministroj, generaloj, direktoroj kaj ceteraj riĉuloj, sed ordinaraĵoj homoj devas solvi la situacion alie: ili metas en sian valizon manĝaĵojn kaj trinkaĵojn kaj en Germanio aĉetas nenion.

La distanco inter Česká Kubice kaj Furth (11 km) postulus laŭ niaj tarifoj 8 Kĉs, sed mi devas pagi 165 Kĉs! Limkontrolo en la rapidtrajno Praha-München-Lindau-Bregenz-Zürich. Unua doganisto: "Ĉu vi veturas al Germanio?" Antaŭ ol mi sukcesis diri, ke mi veturas al Aŭstralio, li estas jam en plua kupeo. Dua doganisto: "Ĉu vi havas ion por deklari?" Antaŭ ol mi povas respondi, ke mi kontrabandas la Oran Trezoron de la Respubliko, ankaŭ li jam staras en la plua kupeo. Tria doganisto: "Kiom da mono vi transportas?" Antaŭ ol mi kapablas informi, ke mi transportas unu milionon da usonaj dolaroj, li jam demandas la samon en la plua kupeo. Post ĉi tiu stranga kontrolo - oni nek metis stampon en mian pasporton nek enrigardis en mian ledsakon - kaj post ŝanĝo de lokomotivo la trajno forlasas nian stacion.

Ni ĉiuj rigardas elfenestre la pejzaĝon. Urtikoj, kardoj kaj aliaj herbaĉoj informas, ke ni estas ankoraŭ en ĉeĥoslovakio. Domoj ebenigitaj kun la tero, praarbaroj ambaŭflanke de la fervojo. Tie ĉi kuris la Fera Kurteno. Komunistoj vokis "amikecon inter la popoloj!" kaj metis inter ili dorndra-

tojn. Post 4 km la trajno transveturas la ŝtatlimon. Kaj tuj kvazaŭ oni svingus sorĉbas-tonon - bone kultivitaj herbejoj kaj kampoj sen trudherboj, bonstate konservataj domoj de terkulturistoj.

En la bavara limstacio Furth im Wald ni 20 minutojn atendis la germanan limkontrolon, sed tiu nur jetas al ni rigardon kaj iras plu. Ankaŭ sen meti stampon en nian pasporton, sen rigardi en niajn mansakojn.

La stacio surprizas min. Mi memoras de antaŭ 50 jaroj longan koridoron, tri elirejojn, atendejon, restoracion necesojn - nun la koridoro estas murfermita, restas nur unu elirejo, nenia atendejo nek restoracio. Por kio atendejo? Ĉiu alvenu mallonge antaŭ la forveturo de la trajno. Por kio restoracio? Ĉiu plenŝtopu sin hejme. Feliĉe ili ne diris: Ĉiu pisu hejme... La neceso funkcias.

Mi forlasas la stacidomon kaj celas al la urba placo. Bonvenigas min viglaj stratoj, bone konservataj domoj sen falanta stuko, en ĉiu domo vendejoj plenŝtopitaj de varoj, mi enas al mi agrable vendistinoj, kvankam mi nenion aĉetas. Eĉ ne bildokarton kun simbolo de Furth - kraĉanta drako. La vendejoj estas plej ofte memservaj. Kvin horoj ne sufiĉas por trarigardi urbon kun 100 mil loĝantoj, sed tamen mi vidis tiom, ke tio jetus la homon teren - vespere mi ne povas ekdormi pro kolero kaj ankaŭ envio.

Kiam mi en Česká Kubice preterpasas la stacidoman necesojn, pasaĝero al mi vokas el fenestro: "Vi estas feliĉa homo loĝante ĉe ŝtatlimo. Vi povas veturi al Furth ĉiutage!"

Stultulo. Ĉiutage pagi 165 Kĉs, kiam mi ricevas 50 Kĉs de ĉiutaga pensio...

Hodiaŭ mi decidis denove ekskursi al Furth. Sed mi ne plu jetos en la fervojan faŭkon 165 Kĉs, mi busos 3 km al Follmava kaj marŝos 5 km piede.

Mi alvenas al nia doganejo. Kiel malsaĝa azeno mi deziras stampon en mian pasporton kaj kontrolon de mia ledsako. "Kolego faros" indiferece sendas min doganistoj unu al la alia. Mi ruĝiĝas kiel kuirita kankra pinĉilo: Kisu al mi la postajon! - kaj mi daŭrigas la vojon. Ankaŭ ĉi tie domoj ebenigitaj kun la tero, ankaŭ ĉi tie kuris la Fera Kurteno. Antaŭ 50 jaroj mi iradis tiun ŝoseon piede aŭ bicikle al mia laborloko.

La germanan doganejon mi trairas tute senĝene. Kiam mi alvenas al Furth, mi volas vidi la tri fabrikojn, kie mi laboris antaŭ duonjarcento. Mi venas al la lignoŝufabrika kaj jodlas! - la tuta fabrika ebenigita kun la tero kaj anstataŭ ĝi aŭtoparkejo. Mi migras al la vitrofabrika kaj gapas buŝmalferme - ankaŭ tiu ĉi fabrika elsarkita kaj anstataŭ ĝi tute alia fabrika. Mi rapidas al la meblofarejo kaj jen: anstataŭ mebloj - ŝuvendejoj!

En la kadro de la merkata ekonomio miloj kaj miloj da fabrikoj, farejoj, vendejoj, terkulturejoj bankrotis, la konkurenco ilin englutis, ali konstruis ilin, sur iliaj lokoj elkreskis parkejoj, loĝdomoj, magazenoj. Laboruloj devis serĉi alian laboron, multaj restis senlaboraj. Ankaŭ en Furth.

Vespere mi reveturas trajne, ĉar lastfoje germana konduktoro ne senvalorigis mian veturbiletton, kiu validas du monatojn. Kaj denove li ne venis - do mi povas ekskursi ankoraŭ la trian fojon!

Amen ...



KORESPONDI DEZIRAS:

El Nepalo:

* Kabindra Raj Shakya, P.O.Box 282, KATHMANDU; studento, komencanto, volas korespondi kun geesperantistoj, bezonas E-librojn gazetojn kaj vortaron de Esperanto *

El Kubo:

* Olvaro Raúl Jaldés, La Caoba, Sanacas, Villa Clara, Cuba 54510; 26-jara kubano, arbara teknikisto deziras korespondi kun geesperantistoj el Ĉeĥoslovakio *

El Hispanio:

* Lilia Konstantinova, c/. Teodoro Llorente, 22 - 5a, 46 960 ALDAYA (Valencia); 31-jara esperantistino volas korespondi pri astrologio, vojaĝoj, sano kaj nutrado *

El Pollando:

* Joanna Cyninska, ul. Lyszko-wicka 17, 99-400 ŁOWICZ; 23-jara fraŭlino laboranta kiel librotenistino, volas korespondi en esperanto kaj trovi novajn amikojn en Ĉeĥoslovakio, ŝi ankaŭ lernas la anglan *

Ĉiuj, kiuj vizitis sekretarion de ĈEA en Praha, Jilská 10, jam scias, ke la sekretariejo nun laboras en vere limigita kaj minimuma spaco kun minimumo da konstantaj laborantoj. Ni esperas, ke vi ĉiuj komprenos, ke la sekretariejo en Jilská strato ne plu povas servi kiel deponejo de valizoj aŭ pakajoj, kiel kunvenejo; ke niaj laborantoj ne plu povas akompanadi turistojn, sekurigi, sen antaŭa mendo, tranoktejojn k.s. Ni dankas pro la kompreno ĉiujn.

Český esperantský svaz
110 01 Praha 1, Jilská 10
***** STARTO *****

Presorgano de Ĉeĥa Esperanto-Asocio.
Aperas 6-foje jare. Respondeca redaktoro:
Miroslav Malovec, Bosonožská 15,
625 00 Brno, Ĉeĥoslovakio.
Administratoro: Karel Daněk, p.k. 425,
660 25 BRNO 2, Ĉeĥoslovakio.
Abonebla ĉe UEA, ĉe niaj perantoj aŭ rekte
ĉe nia asocio.

Nepravideľný vĕstník Ĉeského esperantského
svazu. Vychází 6x ročně. Obdrží členové
svazu. Odpovědný redaktor - Miroslav
Malovec, Bosonožská 15, 625 00 Brno.
Administrátor: Karel Daněk, pošt. příhr.
425, 660 25 Brno 2.

Presas:



NOVINOVÉ DOPLATNÉ

Podávací pošta
664 03 Podolí u Brna
Povoleno JmŘS Brno
č. j. P/3-8847/91
ze dne 28.8.1991